# LEGI

La « Espéranto-Gironde » Informilo

MARTO 2011

N° 127




## EN APRILO:  TRI MEMORTENENDAJ DATOJ


SABATON LA 9AN:  ST CIERS SUR GIRONDE (paĝo 4 )

SABATON LA 16AN:  CAMBES (paĝo 1)

MERKREDON LA 20AN:  LIBOURNE (paĝo 3)

## EN MAJO:

DIMANĈON LA 22AN DE MAJO:  LIBOURNE (paĝo 4)







NE FORGESU REZERVI VIAN KONCERTVESPERON





# La ĜENERALA KANTO
# En la preĝejo St-Sylve

En tiu dimanĉo la 6a de marto 2011, en la preĝejo Saint Sylve en Tuluzo, ĉirkaŭ 150 aŭskultantoj aprezis senpagan koncerton prezentitan de la interregiona koruso INTERKANT: 45 koristoj kaj muzikistoj, gvidataj de la korestrino Franjo Levêque, interpretis la ĜENERALA KANTO.

La ĜENERALA KANTO estas adapto, en esperanto, de 10 poemoj el la oratorio *CANTO GENERAL* de Pablo Neruda, muzikigita de Mikis Theodorakis. Temas pri aro de 150 poemoj publikigita en 1950 de ĉilia poeto Pablo Neruda. (1904-1973).

Plejparte skribita dum kaŝiĝo, la *Canto General* estas batalkrio kontraŭ ĉiuj premataj formoj de la epoko de la konkermilitistoj ĝis tiu de la nuntempaj diktatoroj, sed ankaŭ kanto de solidareco kun la premataj, la humilataj kaj la ekspluatataj homoj.


Vivante ekzile pro kontraŭstaro al la diktaturo de sia lando, Mikis Teodorakis komencis muzikigi parton de la Canto General en 1973. Lia muziko – premsignita de forto, perforto, doloro kaj malĝojo – plifortigas la potencon de la versoj de lia amiko Pablo Neruda.

La 10 poemoj estis kantitaj aŭ deklamitaj en esperanto far la koruso kaj de du solistoj akompanataj per piano, basa gitaro, vibrafono kaj timbaloj. La interpretado de Fabrice, baritono, estis tre kortuŝa, kaj la publikon profunde impresis la juna blindulo, kun sia brajla partituro antaŭ si. Zdravka, mezosoprano, kolektis multnombrajn aplaŭdojn.



***Eltirita de la tuluza gazeto LA KRODODIL' n° 94 Marto 2011, kaj esperantigita de la cenona skipo.***

*Naŭ poemoj estis esperantigitaj de Georges Lagrange en 1999 laŭ peto de la korestrino Franjo Levêque. En majo 2009 fondiĝis INTERKANT kiu kunigas sesdekon da gekantistoj el diversaj francaj regionoj, plus kelkaj muzikistoj, kun la celo riĉigi la muzikan popolan kulturon en Esperanto. Survoje, la Kanto pliriĉiĝis per aldonaj tradukoj de Michel Duc Goninaz kaj Bernard Behra.*




*(Eltirata de la libreto KANTO ĜENERALA eldonita de Fako Kooperativo de SAT en 2010).*

♫ ♫ ♫

## *LIBOURNE – SALLE DES FETES – Place Abel Surchamp*
## *MERCREDI 20 AVRIL à 20 H 30*




CONCERT
Et BAL FOLK !
4 artistes
néerlandais

*Chansons en néerlandais et en espéranto*

*Traduction*

*Danses traditionnelles de leur pays*

*Entrée libre*
*Participation volontaire*

*Soirée présentée par*
*le GROUPE ESPERANTO LIBOURNE*
*et l'Association ESPERANTO GIRONDE*

## EN LA URBO-DOMO DE GALGON

Sabaton la 19an de Marto, je la 11a, ni rendevuis en la urbo-domo por tre agrabla ceremonio. La urbestro kaj kelkaj komunumaj konciliantoj ĉeestis.

Jean-Claude, nia prezidanto, transdonis diplomon « Verda Stelo » al la urbestro kaj faris mallongan prelegon por prezenti la internacian lingvon; estis honoro por Galgon kaj la urbestro sufiĉe fieris.

Du ĵurnalistoj venis, fotis kaj verkis favoran artikolon por Esperanto, en « Le Résistant » kaj en « Sud-ouest ».

Finfine, en tre simpatia etoso, ni tintigis la glasojn!



La Galgona Grupo

## EN LA MEDIATEKO DE ST-CIERS-SUR-GIRONDE

**<u>SABATON LA 9an de APRILO</u>**, inter la 10a kaj duono kaj la 12a kaj duono, Janine, helpe de aliaj anoj de Esperanto-Gironde, prezentos Esperanton. Eble la urbestrino ĉeestos!

Poste, la esperantistoj kune tagmanĝos (verŝajne en loka restoracio, 13 €) kaj posttagmeze vizitos la naturan parkon « Terre d'oiseaux », (6 €). Ĉiuj volontuloj estos bonvenaj!

*Joël*

## EN LIBOURNE

**s**

**Alia Dato: <u>DIMANĈON LA 22an de MAJO</u>,**

**Ni parolos pri la kongresoj de SETE kaj de KUBO kaj, eble, ni spektos la tutnovan filmon pri Esperanto.**

***Joël***

Vizitis nian ĉiumardan kurson Joël por babili kaj prezenti la esperantan movadon, tiel nacian kiel internacian, fronte al atentoplena kaj silenta aŭskultantaro. Ĉeestis tiun kunvenon, krom la du kutimaj gelernantoj, du aliaj gestudantoj, verŝajne interesataj al E-o.

Joël ankaŭ klarigis kiel li mem malkovris la lingvon. Fine, li proponis starigi publikan prezentadon en septembro.

Tiu kursaro kiu komenciĝis en pasinta novembro bedaŭrinde ĉesos fine de aprilo pro la studa jarfino. La celo estas daŭrigi la nunan sesion en la venonta studjaro por ke la gelernantoj atingu la ekzamenan nivelon de la unua grado.

*Bruno*

*Ni kore dankas vin, amikoj konataj kaj nekonataj, pri la sendado de agrabla poŝtkarto de Montendre. Viaj subskriboj estas kvazaŭ esperantaj steletoj !*

*Laura kaj Sabine*

**Karaj geamikoj,**

**Ni bedaŭras sciigi al vi la malaperon de nia kasistino-sekretariino Elsa Bianchi, mortinta je la komenco de februaro. Ŝi estis amikino nia, tre sindonema por nia esperantista asocio. Ŝi estis dinamika kaj humurplena dum siaj aktivaĵoj en servado al aliuloj, ĉu en la Ruĝa Kruco, ĉu okaze de siaj vizitoj en la hospitalo de Sainte Foy la Grande apude de la maljunuloj kaj tio, malgraŭ sia malfortiĝanta sanstato.**
**Ŝi grave mankas kaj mankos al ni, en nia Asocio Esperanto en Pays Foyen.**
**Laura, Sabine, Marcelle, Thierry, Yacine, Claire kaj Marie-Hélène.**

**Kisojn**
**Marie-Hélène**

**MATUZET**…. (daŭrigo)

Tamen ŝajnis, ke al Ŝaru mankis io. Li denove malaperis sen fanfaro, kaj lasis nin tute konsternitaj. Najbaroj tede ripetadis :

***- Alia familio akceptis ĝin; oni ne povas kredi, ke ĝi estas arbara kato!***

Vane, tagon post tago, ni esperis, ke li estas revenonta. Efektive post multe da zorgoj li retrovis la vojon.

***- Matuzet, Matuzet, kio okazis al ci? Ĉu ci batalis kontraŭ mala-miko? Cia kapo sangis, ci malgrasiĝis.***

Mi ne tre kuraĝis purigi la vundon. Tamen mi provis kaj leĝere fro-tis. Post kelkaj tagoj mi ne konstatis pliboniĝon, male.

***- Oh Matuzet, ne gratu cian vundon! Ĝi ne cikatriĝos! Nun ci havas febron, tro sekas cia nazo.***

Amikino proponis veturigi min ĉe la bestkuraciston, kiu timigis lin. La kata rigardo aspektis freneza. Li saltegis serĉantan aperturon kaj baldaŭ provis kaŝi sin sub mebleto. Miaj alvokoj tute ne efikis, sed la bestkuracisto kutimis kaj lerte agis, lerte persvadis.

***- Dum tiu kato estos anesteziita, oni povos kastri ĝin. Tiamaniere ĝi malpli batalos kaj vivos pli kviete kun viaj katinoj. Ĝi ne estos logata de la arbaro.***

Tuj ni ne konsentis. Ne estis tio la kialo de nia konsulto.

***- Tamen, pripensu la aferon.***

Mia amikino kaj mi interparolis. Kion fari? Ni argumentis, kaj fine, kun premitaj koroj, lasis Ŝaru ĝis vespere.

Ni ricevis ŝokon kiam ni revidis Ŝaru duondormantan. Denove en kaĝo li miaŭis triste. Ĉu pro emocio, ni ne komplete fermis tiun kaĝon. Ni apenaŭ levis la fermoplaton, kiam li saltis el la veturilo, stumblis, kriante, kaj nun rapide malaperis. Mia amikino kriis:

***- Nekredeble! tiu sufoka afero! Li havas pansaĵon kaj li sin forsavis. Kien?***

Mi alvokis, alvokis .. ***"Mi, mi, mi,"*** .. mi kuris ĝis arbaro proksima, ne plu povante spiri. Bategis mia koro. Mi ne plu povis kuri. Amikino multe serĉis, vane. Post momento mi rekomencis mian :" ***mi, mi, mi***," . Ni veaspektis. Ankaŭ la espero forkuris.

Ĉu vi kredis miraklon?  Jes, Ŝaru sin kaŝis en la remizo, kaj venontan matenon li miaŭis, kiam li sentis min proksime. Mi ekkriis:

- ***Matuzet!  Matuzet***!

Li estis tute vekita kaj mi pensis ke li tre malsatas. Malrapide mi paŝis rekte al li kaj karesis lin – larmoj pro ĝojo. Li ne plu timis reveni hejmen. Lakto, kraketoj….  denove malsovaĝigita.

Post kelkaj tagoj la diversaj vundoj cikatriĝis. Li multe zumadis. La du minetz  estis denove jaluzaj. Oni povis supozi, ke li fariĝos hejmsidema. Li bezonis, ke ni plu zorgu pri li.

Poste li denove saltis kaj mordetis niajn surojn. Malgraŭ nia atento, ni ricevis doloron, kaj ne fidis lian sintenon. Tamen ni ne povis ĉiam skoldi lin, nek surmeti botojn!  Ĉu li profunde sentis, ke ni dubas pri liaj amatentoj?  Kiam la fido forvaporiĝas sufiĉe, malpliintensiĝas la amikeco.

Bele sunis kiam Ŝaru adiaŭis nin.

Ni ne plu vidas lin de pli ol tri monatoj.
Filino mia diris:
***- Lasu Ŝaru vivi alie sian katan vivon sen bedaŭro!***

Ha, Matuzet !!!!!

***Sabine***



Red.notoj:

**Ŝaru**: franclingve “chat roux”= “rufa kato”
**Père Ubu**: personaĵo kreita de franca verkisto Alfred Jarry (1873-1907)
**Matou**: (matu), en la franca: nekastrita domkato
**Minetz**:  franca vorto: katoj

# ESTRARO
## de
## « ESPÉRANTO-GIRONDE »
* * * * * * * * *

Centre Culturel  Château Palmer
33150 CENON

Banque Postale : 347771 F Bordeaux

*****************

Prezidanto : Joël LAJUS
1 Les Places
33910 SABLONS DE GUITRES
Tel : 05 57 69 26 96
Mail : lajus.joel@wanadoo.fr

Sekretario : (vaka posteno)

Kasistino : Monique DUSSENTY
76 avenue La Fontaine
33560 CARBON BLANC
Tel : 05 56 06 74 49
Mail : monique.duss@free.fr